Sceno 3

Petro inspektas la Pseŭdo-Silvjan paradon.

Pseŭdo-Silvja1: Mi estas granda.
Pseŭdo-Silvja2: Mi... pli granda!
Petro: La unua estas granda. La dua estas pli granda.
Pseŭdo-Silvja3: Mi estas malgranda.
Petro: Jes, la tria estas malgranda,
sed la kvara estas pli malgranda.
La kvina estas alta,
kaj la sesa estas pli alta.
La sepa estas... dika,
kaj la oka estas...
Pseŭdo-Silvja8: ...pli dika! Haha! La plej dika!

__-ig__ = to bring about the state expressed in the root:

La komputilo ne haltas.
Korvaks ne povas halt**ig**i ĝin.
La reĝo halt**ig**os ĝin.

Comparative: **pli (ol), plej**
pli = *more, -er*
pli granda *(bigger),* pli kuraĝa *(more courageous)*
Silvja estas alta. Mazi estas **pli** alta. Mazi estas **pli** alta **ol** Silvja.
plej = *most, -est*
Mazi estas la **plej** saĝa. *(wisest)*

Sceno 4

La reĝo estas en la komputilo.

Reĝo: Helpu min, Korvaks!
Kovaks: Mi ne povas, Via Majesto.
Reĝo: Malsaĝulo, vi!
Korvaks: *(al si mem)* Ho, kion mi povas fari?
Ho, mi povas forkuri... Ho, jes, per helikoptero!
Reĝo: Helpu! Helpu! Korvaks! Korvaks!
Korvaks: *(al la reĝino)* Pardonu min, Via Majesto!
Reĝino: Kio okazas? Kien vi kuras?
Korvaks: Al la helikoptero.
Reĝo: Helpu!
Reĝino: Ho! La reĝo estas en la komputilo!
Korvaks! Haltu! Revenu! Korvaks!



__-n__ for movement, direction

Korvaks iris supre**n**.
Karlo iris malsupre**n**.
Kie**n** vi kuras? —Al la helikoptero.

Karlo: Hej, haltu! Mazi, iru supren al la komputilejo.
Helpu la reĝinon! Mi haltigos Korvaks!
Mazi: Ho, pardonu min.
Silvja: Pardonu min.
Karlo: Haltu, haltu, haltu, haltu!

Sceno 5

En la komputilejo.

Reĝino: Ho! Kio estas tio?
Silvja: Ne timu! Tio estas Mazi, nia amiko. Mazi, prezentu vin!
Mazi: Via Majesto!
Reĝo: Kio okazas? Kio estas tiu objekto?
Reĝino: Ho, pardonu, tio ne estas objekto. Jen Mazi, nia amiko!
Reĝo: Li ne helpos min. Kie estas Korvaks?
Reĝino: Ho, jes. Korvaks helpos. Korvaks estas saĝa.
Reĝo: Tute ne! Li estas malsaĝulo!
Mazi: Mi helpos vin, Via Majesto!
Reĝo: Vi? Vi ne povas!
Mazi: Mi povas! *(Li manĝas parton de la komputilo.)* Bongusta!
Silvja: Kion vi faras,Mazi?
Mazi: Momenton!

-**ul**: *makes a person characterized by the root*
riĉ**ul**o *(a rich person)*
jun**ul**o *(a young person; youth)*

Ĉu li estas saĝa?
—Ne, li estas malsaĝ**ul**o.

Sceno 6

Reĝino: Kion vi faras, Mazi?
Mazi: Pardonu min, mi estas malsata!
Reĝino: Malsata? Sed la reĝo estas interne! Kial vi manĝas tion?
Mazi: Ĉar mi ŝatas tion. Ho, mi komprenas. Ĝi eniras tien. Ĝi eniras ĉi tien. Ho, ne!
Silvja: Atentu, mi petas, Mazi!
Mazi: Ĉio estas en ordo! Ĝi eniras tien... kaj ĝi eniras tien ĉi!

Sceno 7

Mazi: Bone, Via Majesto. Mi estas preta.
Reĝo: Ankaŭ mi! Terura varmo!
Reĝo: *(ekster la komputilo)* Ho! Nun estas pli bone!
Reĝino: Dankon, Mazi. Vi estas saĝa!
Silvja: Kie estas Karlo?
Reĝino: Karlo? Karlo, la ĝardenisto? Ho, rigardu!
Silvja: Karlo! Mia Karlo!
Reĝo: Antaŭen!
Silvja: Mi amas vin! Mi amas vin!
Mazi: Kuraĝon! Kuraĝon!
Reĝo: Brave! Brave! Bone!
Ĉiuj: Hura! Bone! Brave!
Reĝo: Nu, bone! Ni kaptis lin! Korvaks, Korvaks! Vekiĝu!
Korvaks: Kial? Kio okazas? Kiu estas vi? Kie mi estas? Kial mi estas ĉi tie? Kiu mi estas?



Sceno 8

Silvja: Vi estas Korvaks. Vi estas malsaĝa!
Korvaks: Jes, mi estas malsaĝa... Ne, ne! Mi estas saĝa.
Reĝo: Vi ne estas saĝa, Korvaks.

Karlo eniras kun gardistoj.

Karlo: *(indikas al Korvaks)* Arestu lin!
Reĝo: Jes, forportu lin!